

Humphrey Tonkin

Universitato de Hartford, Usono

Interlingvistiko kaj la koncepto de espero

Resumo: Zamenhof ne konceptis sian internacian lingvon kiel nuran praktikan solvon al praktika problemo sed kiel idealistan elpaŝon: la koncepto de espero estas esprimita en la pseŭdonimo de la aŭtoro – kiu fariĝis la nomo de la lingvo mem. En la unuan libreton kiu elskizis lian lingvon, Zamenhof metis la poemon “Mia penso”, kiu spegulis la biblian koncepton de espero. La koncepto mem staris malantaŭ multaj internaciistaj proponoj de la epoko – kaj ankaŭ malantaŭ la pola naciismo. Vizitante Vaŝingtonon en 1910, Zamenhof aparte identigis Usonon kiel prezentantan similajn ideojn de espero, inkluzivo kaj libereco.

Ŝlosilvortoj: Zamenhof; espero; Esperanto; Unuiĝintaj Nacioj; homaj rajtoj; Unuiĝintaj Ŝtatoj

1 La Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj

La lingvo Esperanto naskiĝis kiel lingvo de iu doktoro Esperanto: la aŭtoro kaj la lingvo portis kaj portas la saman radikon. Kion tio implicis en la jaro 1887 kaj kion ĝi implicas en la jaro 2025?¹

Antaŭ duonjarcento, en 1976, oni invitis min aperigi en la revuo de la Universitato de Pensilvanio Esperanto-tradukon de la usona Deklaracio de Sendependeco. Parte pro mia interesiĝo pri Unuiĝintaj Nacioj, mi estis nomita membro de komisiono en Filadelfio por festi la ducentjariĝon de la Deklaro. Laŭ la komisiono, aperigi la Deklaron en Esperanto samtempe agnoskus ĝian universalan signifon, kaj asertus, ke la laboro por tutmondaj paco kaj kunlaboro estas ankoraŭ nekompleta: ĝin realigus nur kombino de laboro kaj espero – laboro por praktikaj solvoj de mondaj problemoj, kaj espero por daŭrigi tiun laboron. La aspiroj vortigitaj en la Deklaro aplikiĝas (tiel oni rezonis) ne nur al Usono sed al la tuta mondo. La traduko bone akceptiĝis.

1 Versio de tiu ĉi referaĵo estis prezentita en la Dulanda Esperanto-Kongreso en Toronto la 12-an de julio 2025. Alia versio estis prezentita la 31-an de julio 2025 en la 47-a Esperantologia Konferenco kadre de la 110-a Universala Kongreso de Esperanto en Burno, Ĉeĥio.

Se vi rimarkas ligan inter la nomo *United States* kaj la nomo *United Nations* vi ne eraras. La usona prezidento Roosevelt unue publike uzis la esprimon “unuigintaj nacioj” en 1942 por priskribi la unuecon de la aliancanoj en la Dua Mondmilito.² En 1945 ĝi fariĝis nomo de la internacia organizaĵo kiu naskiĝis en Sanfrancisko fine de tiu milito, kiel posteulo de la Ligo de Nacioj. Vole-nevole, Usono heredis specialan moralan respondecon pri la nova organizo.

Inter la grandaj atingoj de Unuiĝintaj Nacioj en la unuaj jaroj estis la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, akceptita en 1948. La Deklaracio fariĝis la morala kaj jura bazo de la kunlaboro inter la nacioj kiun la fondintoj de UN antaŭvidis. Preskaŭ okdek jarojn poste, ĝi ankoraŭ validas.

La vidvino de la usona prezidento, Eleanor Roosevelt, ludis ŝlosilan rolon en formulado de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj. Ŝi laboris kun internacia teamo de juristoj kaj diplomatoj. Inter la junaj asistantoj de s-ino Roosevelt estis eĉ esperantisto: la aŭstralia diplomato kaj juristo Ralph Harry.³

Tiel, eble la spirito de Esperanto iel influis tiun fundamentan dokumenton de la internacia juro. Tamen, Eleanor Roosevelt mem esprimis relativan neinteresiĝon pri Esperanto en letero kiun mi posedas responde al demando de la konata usona esperantisto Mark Starr...

Universala Esperanto-Asocio, konscia pri la naskiĝanta deklaro dank’ al la atentigo de, interalie, la juna jugoslava juristo Ivo Lapenna, konstruis en sian postmilitan statuton specifan aludon al la homaj rajtoj, kiujn ĝi nomis “esenca kondiĉo” por la laboro de la Asocio (Lapenna/Lins/Carlevaro 1974, 396). Tio okazis jam en 1947, do eĉ unu jaron antaŭ la akceptiĝo de la Universala Deklaracio. La koncerna paragrafo restas parto de la hodiaŭa statuto de la Asocio.

2 La revo de perfekto kaj la realo de antcipio

Alia esperulo, sesdek jarojn pli frue, formis similan bildon pri nova internacia ordo. Same kiel Usono kaj same kiel Unuiĝintaj Nacioj, la lingvo de Ludoviko Zamenhof naskiĝis en etoso de espero. Ne estis lia intenco nomi sian lingvon *Esperanto*. Publikigante la lingvon en la jaro 1887, li nomis ĝin simple “Internacia Lingvo”. Por maski la propran identecon, li elektis kiel kaŝnomon “D-ro Esperanto”. Tiuj kiuj legis la etan lernolibron kaj lernis la gramatikon kaj vortprovizon eksciis, ke “Esperanto” signifas en la nova lingvo “iu kiu esperas”.

2 En la “Declaration by United Nations” (1942).

3 Morsink (1999, 16) kaj vidu Egan (2023).

La unuaj adeptoj do nomis la novan lingvon “la lingvo de Esperanto” – la lingvo kreita de d-ro Esperanto. D-ro Esperanto ja esperis (kiel evidentis jam en tiu unua libro) pri mondo de kompreniĝo, de kunlaboro, de tolero, de paco.

Sed tiu vorteto “de” estas glitema: facile ĝi malaperas. Tiel la lingvo fariĝis ne la lingvo *de* Esperanto sed simple la lingvo Esperanto: la nomo de la kreinto fariĝis la nomo de la lingvo.⁴

Tion d-ro Esperanto ne intencis: li insistis, ripete kaj firme, ke ne li posedas la lingvon, sed la homaro. Ŝajne unike inter la proponintoj de internaciaj lingvoj, Zamenhof deziris, ke la lingvo kresku de interne, en kolektivo, pere de siaj parolantoj, ne pere de liaj dekretoj. Inter la unuaj rezultoj de tiu ideo tamen estis, ke, spite liajn protestojn pri neproprieto, la “lingvo de Esperanto” fariĝis la lingvo Esperanto.

Kial d-ro Zamenhof nomis sin “Doktoro Esperanto”? En la pli vasta socio en kiu li kreis la lingvon ne regis multaj motivoj por esperi. Kiel judo li estis ano de gento preskaŭ universale malestimata. Kaj li loĝis inter poloj kies lando jam de preskaŭ unu jarcento ne plu ekzistis: ĝi estis asimilita en la Rusan Imperion, kie antisemitismo kaŭzis konstantajn sociajn perturbojn. Li vivis en la ombro de pogromoj, sub la jugo de fremdaj potencoj. Li mem, kiu fariĝis kuracisto kaj tiel mem akceptis la nocion, ke la scienco kapablas plibonigi la homan vivon – kaj kiu samtempe amis vortojn, admiris poetojn – li mem tamen perceptis, ke la progreso de homa scio kaj la teknika faciligo de komunikado – ĉio ĉi aŭguris novajn eblecojn por la homaro, se tiuj homoj sufiĉe saĝos por ilin kapti.

Unu paŝo laŭ tiu direkto estus internacia lingvo facile lernebla – por nutri la homan scion kaj kunlaboron en kunteksto alia ol la nacieco, alia ol la ŝovinismo – kaj en etoso de egaleco.⁵

Proponoj pri nova facile lernebla internacia lingvo, kiel ni bone scias, abundis dum tiu ĉi epoko, sed esplorantoj de la historio de t.n. interlingvistiko egale bone scias, ke plej ofte tiuj proponoj estis produktoj de lingvaj amatoroj aŭ de homoj pli interesitaj pri lingvoj aŭ abstraktaj ideoj ol pri homoj. Mi ne kuraĝus diri, ke Esperanto estis unika inter tiuj projektoj pro sia emfazo je espero, sed ĝi certe tion emfazis plej eksplícite.⁶

4 Pri la kaŝnomo Doktoro Esperanto, vidu, i.a. Maimon (1978, 129–142). Maimon atentigas, ke tiu kaŝnomo ja ne longedaŭre efikus: la juna doktoro Zamenhof publikigis mem sian Unuan Libron: ĝi estis presita de aliulo, sed Zamenhof estis kaj eldonanto kaj verkinto, kaj do respondecis ankaŭ pri distribuo k.s.

5 Ĉiuj biografoj atentigas, tute kompreneble, pri la ekstreme komplika lingva situacio en kiu Zamenhof kreskis kaj vivis. Vidu ekzemple la biografiojn de Boulton (1960, 1962) kaj Korĵenkov (2009), kaj la artikolon de Lins (2007) – kaj Beckman kaj Feierstein (2023).

6 Pri la kontrasto kun Volapük, ekzemple, vidu Garvía (2015).

La juna Zamenhof vivis sub politikaj cirkonstancoj certe malesperigaj, sed espero ne estis fremda al li. Li trovis tradicion de espero en la propra religio. La Malnova Testamento estas kroniko de la potenco de espero – tamen sub la kompreno, ke la espero troviĝas en la strebado, ne en la plenumo. Dio promesas al Moseo rigardon al la Promesita Lando, sed Moseo mortas sur la Monto Nebo rigardante la neatingitan Kanaanon (ni memoru la poemon de Kalocsay...). La strebado neniam finiĝas.

Simile, kristanoj konsideras la Malnovan Testamenton kvazaŭ esperan antaŭvidon de la Nova, sed la mortigo kaj releviĝo de Jesuo estas promeso, ne en si mem realigo, de la Sankta Civito. Kiel d-ro Esperanto, Zamenhof kvazaŭ reprezentis la *revon* de perfekte sed la *realon* de antcipio: en la homa strebado troviĝas la dumviva kompenso.

3 La zamenhofa espero

Kiu ne konas tiun interpreton legu foje la plej belan el ĉiuj poemoj de Zamenhof (1984), “Mia penso”, kies fina strofo tekstas:

Fajron sentas mi interne,
Vivi ankaŭ mi deziras, --
Io pelas min eterne,
Se mi al gajuloj iras...
Se ne plaĉas al la sorto
Mia peno kaj laboro –
Venu tuj al mi la morto,
En espero – sen doloro!

Memore al versoj el la biblia libro *Eliro* (15:20),⁷ Zamenhof tiel interpretas la koncepton de espero – ne kiel ion atingitan sed kiel bazan homan deziron pliboniĝi, strebi, trovi plenumon en komuna laboro. Tiu koncepto animis samtempe la lingvon Esperanto kaj la laboron por tutmonda komunikado kaj internacia kunlaboro.

Lastatempa libro sub redakto de Viola Beckmann kaj Liliana Ruth Feierstein (2023), *Language as Hope: L. L. Zamenhof and the Dream of a Cosmopolitan World* (Lingvo kiel espero: L. L. Zamenhof kaj la Revo de Kosmopolita Mondo) esploras ligojn inter tiutempaj ideoj pri la jida lingvo, pri la evoluanta juda kredo en la kunteksto de meza Eŭropo, kaj pri la evoluanta pensado de Zamenhof tra liaj verkoj *Hilelismo* (1901) kaj *Homaranismo* (1913). Ni ne forgesu, ke la plej granda traduka projekto, kiun Zamenhof prenis sur sin estis lia traduko de la Malnova Testamento.

7 “Mirjam, la profetino, fratino de Aaron, prenis tamburino en sian manon, kaj ĉiuj virinoj eliris post ŝi kun tamburinoj kaj dancante.”

Ni ankaŭ ne forgesu, ke Zamenhof serioze interesiĝis pri la propra juda heredaĵo, interalie la jida lingvo kies gramatikon li analizis kaj registris, traktante ĝin ne kiel “ĵargonon” sed kiel parton de la propra kulturo (Zamenhof 1982; pri ĝi: Kiselman 2022, Gishron 1986).

La koncepto de espero staris ankaŭ malantaŭ la tuta gamo de sekularismaj proponoj pri internacia ordo en la periodo de Zamenhof – espero pri paco, kaj fino al la detrua rivalado de la grandaj potencoj; espero pri edukado, kiu nutris la noción de universala baza edukado en Meza Eŭropo kaj aliaj mondogrupoj dum la koncernaj jaroj; espero pri universala rajto al balotado; espero ke la novaj metodoj de transporto kaj komunikado portos la homaron al komuna interkonsento per komuna interkonado. Ekde la komenco, Esperanton karakterizis la ideo de homa kunlaboro por pli bona estonteco, motivita de la espero. Kaj la plej baza, plej emblema formo de kunlaboro estas dialogado kaj konversacio – lingvado.

Similaj sentoj pri espero, je pli naciisma nivelo, animis la polan popolon mem, kies intelektuloj trovis en la Pozitivismo de la franco Auguste Comte inspiron por refortigi la naciismon kaj la naciian identecon kontraŭ la reganta Rusa Imperio. Inter la esprimantoj de tiu sento estis Bolesław Prus, frue tradukita en Esperanton de Kazimierz Bein. Mi ne volas sugesti, ke Zamenhof celis respeguli la polan – nur ke la nocio de nacia lingvo, de komuna kulturo kaj lingva kulturo, inspiris Zamenhof.

En la fruaj jaroj de la lingvo, grandaj debatoj okazis inter tiuj kiuj vidis en Esperanto pure praktikan ilon por internacia komunikado, kaj tiuj kiuj revis pri morala kaj egaleca mondo apogita de komuna lingvo. Ni bone konas la Deklaracion de Bulonjo de 1905, kutime prezentitan kiel interpuŝiĝon inter la idealismo de la juda Zamenhof kaj la praktikismo de la francaj komercistoj kiuj patronis la unuan Universalan Kongreson⁸ - kaj ĉio ĉi en la ombro de la Afero Dreyfus. Zamenhof apartenis firme al la kategorio de idealismo: al li la Internacia Lingvo reprezentis pacigilon, humanan komunikilon, kiu kondukis al pli firma interkompreniĝo. Oni rajtus supozi, ke precize la nocio de espero pri pli bona mondo tenis Esperanton viva. Sed la preciza ekvilibro inter tiuj du fluoj, nome de praktikismo kaj idealismo, estas pli malfacile kalkulebla ne nur en la periodo tuj antaŭ la Unua Mondmilito sed ankaŭ en la postmilita periodo (vidu ekzemple Lins 1990; Waringhien 1959, 397–423).

Zamenhof ne travivis la Unuan Mondmiliton, ne spertis la kolapson de rusa regado en Pollando. Inter liaj lastaj verkoj estis “Post la granda milito: Alvoko al la diplomatoj” el la jaro 1915, kiu, denuncante la ligon inter gentoj kaj landoj, pledis interalie por “Unuiĝintaj Ŝtatoj de Eŭropo” (Zamenhof 1915/1929).

8 Vidu ekzemple Boulton (1960, 1962), Korĵenkov (2009).

Ne estus maljuste sugesti, ke la imago de Ameriko estis unu elemento en la imagaro de Zamenhof tra la tuta vivo. Fakte, lia parolado en la Sesa Universala Kongreso en Vaŝingtono en 1910 montras interesan anticipon de la ideoj malantaŭ la fondo de Unuiĝintaj Nacioj en Sanfrancisko en 1945:

Lando de libereco, lando de estonteco, mi vin salutas! Lando, pri kiu revis kaj nun ankoraŭ revas multaj suferantoj kaj senkulpaj persekutatoj, mi vin salutas! Regno de homoj, kiu apartenas ne al tiu aŭ alia gento aŭ eklezio, sed al ĉiuj siaj honestaj filoj, mi klinas min antaŭ vi, kaj mi estas feliĉa, ke la sorto permesis al mi, vin vidi, kaj spiri almenaŭ dum kelka tempo vian liberan, de neniuj monopoligitan aeron.

(Zamenhof 1910/1929)

Zamenhof emfazis, ke li alvenis la Novan Mondon ne por amuziĝi, sed por disvastigi novan ideon pri internacia komunikado – kaj por kuraĝigi la parolantojn de Esperanto en Nordameriko. Malantaŭ liaj vortoj estis la sento, ke Usono, kaj implice Nordameriko kiel tuto, povas ludi progresigan kaj progreseman, bonvenigan kaj akcepteman rolon en mondaj aferoj. Ne sensignifa estas la fakto, ke Zamenhof vizitis Amerikon dum la plej alta periodo de enmigrado al Usono el la polaj teritorioj sub la rusa jugo.

4 Espero ... kaj realo

Iasence, la pensado de Zamenhof en tiu momento reruliĝis al la komenco, kiam kiel juna studento, korespondanto por la rusa juda gazeto *Razsvjet*, Zamenhof proponis, sub la kaŝnomo Gamzefon, kreon de juda hejmlando en iu neenloĝata teritorio en la mezo de Nordameriko.

En tiu senco, Usono restis, en la menso de Zamenhof, promesita lando, lando de optimismo. Pri ĉi-lastaj li eĉ certagrade pravis, kiel atestus Eleanor Roosevelt kaj ŝia juna asistanto Ralph Harry. En nia hodiaŭa tro cinika ĉirkaŭaĵo en 2026, la flamo de optimismo tamen daŭre briletas. Sed ni – ne nur ni esperantistoj, sed ankaŭ ni *esperuloj* – ni kiuj esperas pri pli bona estonteco, pli humana kaj inkluziva mondo, kun aŭ sen internacia lingvo – nunmomente hezitas antaŭ la evoluo de internaciaj aferoj, precipe (mi aŭdacas diri) pro lastatempaj paŝoj de Usono, mia propra lando, kies nuna retiriĝo el internacia humana agado estas severa, kruela kaj miopa.

Kion dirus doktoro Esperanto se li venus al la bordoj de Nordameriko hodiaŭ, se li vidus la hodiaŭan retiriĝon de Usono el internacia kunlaboro, la abolon de la spirito de akcepto kiu akompanis la respublikon tra tiel multaj jaroj? Ĉu la Statuo de Libereco turnis sian dorson al la alvenintoj, la rifuĝintoj, la serĉantoj de pli bona vivo?

Jam mi paŝas ekster la terenon de interlingvistiko kaj eniras la kampon de politiko. Mi rapide retiriĝu, tamen atentigante ke tiuj kiuj supozas, ke interlingvistiko estas temo por senĝenaj fakuloj, konsciu, ke en ĝia historio oni vidas spurojn, paŭsojn, restaĵojn de homaj konfliktoj kaj homaj aspiroj kiuj neniam ĉesos.

Bibliografio

- Beckmann, Viola kaj Ruth Feierstein, red. 2023. *Language as Hope: L. L. Zamenhof and the Dream of a Cosmopolitan World*. Leipzig: Hentrich & Hentrich.
- Boulton, Marjorie. 1960. *Zamenhof Creator of Esperanto*. London: Routledge and Kegan Paul.
- Boulton, Marjorie. 1962. *Zamenhof aŭtoro de Esperanto*. La Laguna: Regulo.
- “Declaration by the United Nations, January 1, 1942.” 1942. Yale Law School. https://avalon.law.yale.edu/20th_century/decade03.asp
- Egan, Patricia. 2023. Ralph L. Harry: A Legacy of Diplomacy, Human Rights, and Linguistic Equality at the United Nations. <https://esfconnected.org/2023/12/09/ralphlharry-en/>
- Garvía, Roberto. 2015. *Esperanto and Its Rivals*. Philadelphia: University of Pennsylvania Press.
- Gishron, Jeremi. 1986. *Lingvo kaj religio*. Jerusalem: Sivron.
- Kiselman, Christer Oskar. 2022. *Zamenhof's Yiddish Grammar and His Universal Language*. Dobřichovice: Kava-Pech.
- Korĵenkov, Aleksander. 2009. *Homarano: La vivo, verkoj kaj ideoj de d-ro L. L. Zamenhof*. Kaliningrad kaj Kaunas: Sezonoj.
- Lapenna, Ivo, Ulrich Lins kaj Tazio Carlevaro. 1974. *Esperanto en perspektivo*. London/Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo.
- Lins, Ulrich. 2007. “Esperanto oder das Dilemma des Dr. Zamenhof”. *Jüdischer Almanach: Sprachen*, redaktis Gisela Dachs, 127–140. Frankfurt am Main: Jüdischer Verlag im Suhrkamp Verlag.
- Maimon, N. Z. 1978. *La kaŝita vivo de Zamenhof*. Tokio: Japana Esperanto-Instituto.
- Morsink, Johannes. 1999. *The Universal Declaration of Human Rights: Origins, Drafting, and Intent*. Philadelphia: University of Pennsylvania Press.
- Waringhien, Gaston. 1989. *Lingvo kaj vivo*. 2-a eld. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.
- Zamenhof, L. L. 1910. “Sesa kongreso 1910 en Washington.” En L. L. Zamenhof. 1929. *Originala verkaro*, redaktis Joh. Dietterle, 393–400. Leipzig: Ferdinand Hirt & Sohn.

- Zamenhof, L. L. 1915. "Post la granda milito." En L. L. Zamenhof. 1929. *Originala verkaro*, redaktis Joh. Dietterle, 353–357. Leipzig: Ferdinand Hirt & Sohn.
- Zamenhof, L. L. 1929. *Originala verkaro*, redaktis Joh. Dietterle. Leipzig: Ferdinand Hirt & Sohn.
- Zamenhof, L. L. 1982. *Provo de gramatiko de novjuda lingvo kaj Alvoko al la juda intelektularo*. Tradukis kaj komentis Adolf Holzhaus. s.l.: Fondumo Esperanto.
- Zamenhof, L. L. 1984. "Mia penso." En *Esperanta antologio: Poemoj 1887–1981*, redaktis William Auld, 2-a eld., 3–4. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.

Pri la aŭtoro

Humphrey Tonkin estas emerita profesoro pri humanecaj studoj kaj emerita prezidanto de la Universitato de Hartford, Usono. Li magistriĝis en la Universitato de Kembriĝo kaj doktoriĝis ĉe la Universitato Harvard. Li estis prezidanto de UEA (1974–1980, 1986–1989), kaj dum multaj jaroj direktoro de CED, prezidanto de ESF kaj ĉefredaktoro de LPLP. Inter liaj verkoj estas *Memoru ĉi praulojn: Eseoj pri Esperanto-literaturo* (New York: Mondial 2020). Retadreso: tonkin@hartford.edu

About the author

Humphrey Tonkin is emeritus professor of humanities and president emeritus of the University of Hartford, USA. He holds an MA from Cambridge University and a Ph.D. from Harvard. He was president of the Universal Esperanto Association (1974–1980, 1986–1989) and for many years director of CED, board chair of ESF and editor-in-chief of LPLP. Among his publications is *Memoru ĉi praulojn: Eseoj pri Esperanto-literaturo* (New York: Mondial 2020).

Über den Verfasser

Humphrey Tonkin ist emeritierter Professor der Geisteswissenschaften und emeritierter Rektor der Universität Hartford, USA. Er hat einen Mastergrad der Universität Cambridge und einen Doktorgrad der Universität Harvard erworben. Tonkin war Präsident des Esperanto-Weltbundes (1974–1980, 1986–1989) und viele Jahre lang Direktor des CED, Vorsitzender der ESF und Chefredakteur der Zeitschrift LPLP. Eine seiner Veröffentlichungen ist *Memoru ĉi praulojn: Eseoj pri Esperanto-literaturo* (New York: Mondial 2020).

Interlinguistics and the concept of hope

Abstract: Zamenhof did not see his international language as a mere practical solution to a practical problem but as an idealistic enterprise: the concept of hope is expressed in the very pseudonym of its author – which became the name of the language itself. In the first booklet outlining his language, Zamenhof included the poem “Mia penso”, which mirrored the biblical concept of hope. The concept itself lay behind many of the internationalist proposals of the period – and also behind Polish nationalism. Visiting Washington in 1910, Zamenhof particularly identified the USA as embodying similar ideas of hope, inclusion and freedom.

Keywords: Zamenhof; hope; Esperanto; United Nations; human rights; United States

Die Interlinguistik und der Gedanke der Hoffnung

Zamenhof hat seine internationale Sprache nicht nur als bloße praktische Lösung eines praktischen Problems konzipiert, sondern als ein idealistisches Vorhaben: der Gedanke der Hoffnung ist schon in dem Pseudonym des Autors ausgedrückt – das zum Namen der Sprache selbst wurde. In das erste kleine Buch mit dem Entwurf seiner Sprache nahm Zamenhof das Gedicht “Mia penso” auf, das den biblischen Gedanken der Hoffnung widerspiegelt. Derselbe Gedanke stand hinter zahlreichen internationalistischen Ideen jener Zeit – und auch hinter dem polnischen Nationalismus. Bei seinem Besuch in Washington im Jahre 1910 betonte Zamenhof, dass die USA ganz ähnliche Gedanken der Hoffnung, des Miteinanders und der Freiheit verkörperten.

Schlüsselwörter: Zamenhof; Hoffnung; Esperanto; Vereinte Nationen; Menschenrechte; USA